



MONATA BULTENO de la Esperanto-Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA

DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakolo: Str. RODA, 14-16

LA HORLOGO

I

En baraket' purblanka, lokita ĉe ĝardeno
Proksime de la bordo de la Termeza mar',
Plej bela kaj gracia loĝadas la knabino
Pri kiu povis iam fieri la kampar'.

El Valencia lando, ŝi Roz' estas nomita,
Sed ŝajnas florburbuĝono de loga plej parfum'
Per blu' okuloj ŝiaj konkuras kun ĉielo
Orbrilaj ŝiaj haroj — kun sunleviĝa lum'.

Sur ŝia frunt' serena la majesteco sidas,
Kunmikso neĝo-roza nur estas ŝia vang',
De marventet' la plaĉon rideto ŝia havas,
Pasion — ŝia koro, fajrecon — ŝia sang'.

II

Apenaŭ deksep majojn flugintajn vidis Rozo
Kaj jam ĉagren' profunda ŝin premas en la kor',
Jozef', amato ŝia, jus mortis en milito,
Okuloj ŝiaj ravaj ne ĉesas en la plor'.

Infanoj ili estis kaj ĉiam ludis kune,
Iliaj korpoj kreskis, sed kreskis pli kunam',
Li ĉiunokte venis amdiri al Rozeto
Kaj ili nur disiĝis en hor' malfrua jam.

Monat' forpasos sola kaj ili kunedziĝos,
Sed tia bela revo ne plaĉis al Fatal',
Milit' neatendita fariĝis en la lando,
Jozef' varbita estis, foriris al batal'.

En nokt' somera, luma, la junaj geamantoj
Parolis lastafoje en laŭbo de ĝarden'.
"Rozeto, mia kara — li diris larmovoĉe —
Jen la feliĉ' antaŭa jam estas nur ĉagren'."

La bela virgulino eĉ vorton ne respondis,
Premanta korsufero elkreis nur per plor'.
Jozef' emociita aldiris por konsolo;
"Ne timu, mi revenos, mallonge restos for.

Milit' ne estas morto, kuraĝon, do, ni havu
En la danĝero nuna nin helpos bona Di'..."
Sed Rozo ne plorĉesis. Jozefo ŝin karesis
Dum longa neparolo, en ama plenebri'.

Fariĝis tre malfrue, el ŝiaj amaj brakoj
Kisante ŝin ankoraŭ li tiris sin kun pen'.
"Adiaŭ, koramata, — li diris voĉotreme, —
Fidela via amo nur estu mia ben'."

Kaj el la poŝ' preninte batantan orhorloĝon,
Li donis ĝin al Rozo kun jena lasta pet':
"Ĉi tiun donaceton por rememor' ĉiama
Akceptu; por vi taŭgu ĝi kiel amulet'.

Mortante ĝin donacis al mi patrino mia,
Mi ĉiam ĝin kunportis kaj zorgis kun fervor',
Ĝin gardu ĉe la koro, aŭdante la tik-tak-on
Nur kredu, ke ĝi estas la bat' de mia kor'."

III

Sidanta ĉe marbordo silente Rozo ploras
Dum karan orhorloĝon premadas ŝia man'.
De temp' al temp' ŝi fiksas sur ĝi rigardon sian,
Per dolĉa ondplaŭdado bruetas l'ocean'.

Horloĝ' plej enviinda! Restej' ĉiama via
La brusto de knabino, — edena nur karcer' —
De kisoj kiomfoje vi estis karesata,
De larmoj kiomfoje nubigis via sfer!

Malgaje Roz' rigardas la brilan orhorloĝon,
Demandas ĝin insiste pri lia koramat',
Nekomprenante ŝian premantan ĉagrenadon.
Ĝi ĉiam nur respondas per la tik-tak-a bat'.

"Por kio do vi batas, se li jam plu ne vivas?"
—Parolas al ĝi Rozo en kapt' de malesper'—
"Sarkasmo plej kruela — aldonas ekscitita—
Per via bat' samtona pliiĝas la sufer'!"

Kaj ŝi sin levas nerve kun penso pereiga.
Horloĝo malfeliĉa, jen via lasta hor'!
Ŝi volas ĝin disrompi, sed ŝi subite haltas.
"Ho, ne, Jozef' pardonu! Ĝi estas lia kor'!"

IV

Du jaroj jam forpasis; la belan orhorloĝon
Ĉe koro ĉiam portas Rozet' kun zorga ŝat',
La tempo, plej efika balzam' por amsuferoj
Mildigis rememoron pri la mortint-amat'.

Alia juna viro pasie Rozon amas,
Najbaro ŝia estas kaj riĉa fiŝkaptist',
Plej ofte li proponas al Rozo sian amon,
Rifuzas ŝi sed ĉiam kun plaĉ' pri la persist'.

Kaj en la koro ŝia fariĝas malkvieto,
Funebra rememoro batalas kun ekam'.
Ĉu venkos pasintaĵo? Triumfos l'estanteco?
"Neeble pri virinoj diveni" — diras fam'.

"Aŭskultu, bela Rozo, — la fiŝkaptisto petas—
Pro kio mian amon akceptas malestim'?
Ĉu vi min vidos morti pro amo senkompate?
Ekbrili mi ne vidos esperon en l'anim'?"

La plendon lian aŭdas Rozeto kortuŝata,
Por lin konsoli milde ŝi trovas preta sin,
Sed ĉe la brusto batas horloĝo de Jozefo...
Kun vangoj fajroruĝaj silentas la knabin'.

V

De tag' al tag' li velkas per ama suferado,
Bedaŭras lin Rozeto, kaj tre rapide l'am'
Forpelas la kompaton sentitan al junulo...
Horloĝ': en la batado vi povas ĉesi jam!...

VI

En tago de printempo la fiŝkaptist' kaj Rozo
Sur glata roko sidas ĉe bordo de la mar'.
Parolas ili gaje, mallaŭte kaj intime,
Kadence plaŭdetadas kun dolĉa son' l'ondar'

"Sed kial vi prokrastis akcepti mian amon?"
—Demandas ŝin scivole l'amata jam junul'.—
Kaj ŝi respondas tiam montrante l' orhorloĝon,
"Jen tiu ĉi horloĝo nur estas la kulpul'.

Jozef' forveturonte al la kruel-milito
Ĝin donis kiel signon al mi de rememor'.
"Dum batos ĝi regule—li diris larmovoĉe—
Nur kredu, ke ĝi estas la bat' de mia kor'."

De tiam ĝi neniam ĉesigis sian baton,
Ĉe mia brust' mi sentas batantan ĉiam ĝin...
Mi kredis, ke vin ami nur estas jurorompo,
Sakrilegi' terura por koro de virin'."

La Fiŝkaptisto prenas horloĝon el man' ŝia,
Rigardas ĝin mallonge kaj sen klariga vort'.
Sentante neregeblan jaluzan furiozon
Ĝin ĵetas sur la rokon per tuta sia fort'.

Rozet' ellasas krion, rekaptas ĝin rapide,
Kaj diras ridetante kun amrigard' al li;
"Ho kia malbonkoro! Kompatu ĝin, karulo,
Sed vidu, vidu, ĝoju, ankoraŭ batas ĝi!..."

VII

Ho kor' nedeĉifrebbla de rava plej virino,
Horloĝo vi nur estas por amo de la vir'!
Se vi lin amrespondas, horloĝ' rapide batas,
Ĉar viv' de feliĉulo nur estas rapidir'.

Se vi lin amrifuzas, horloĝ' malvigle batas
Ĉar viv' malgaja fluas kun malrapida ŝov',
Se via kor' sensenta fariĝas kiel ŝtono,
Horloĝon vi ne streĉas kaj restas ĝi sen mov'.

Originale verkis,
VICENTE INGLADA.

EL «MEMORAĴOJ DE ĈASPERDIKO»

(Memorias de un reclamo)

Fantazia rakonto originala de Johano Vázquez del Río

Ne estas same Alta Ĉambro, ol *ĉambro alta*, malgraŭ tio, ke ambaŭ estas ofte plenigitaj je malnovajoj.

La gentoj de mia vilaĝo—andaluzia, montara kaj preskaŭ marborda urbeto—nomas *ĉambro alta* la duan kaj lastan etaĝon de la loĝejoj, tiun maloportunan oportunajon, en kiun krom la grenoj, fruktoj kaj terkulturiloj ankaŭ finvenas ĉiuspecaj absurdaĵoj forjetindaj, sed ne forjetitaj, ĉar por tion eviti ekzistas la *ĉambro alta*, kie sub polvo kaj araneajoj ili trovas restadon preskaŭ senfinan nur malkvietigotan de musaj grinckrietoj kaj trilpepado de timemaj hirundoj.

Dum miaj oftaj vizitoj al la domo de miaj antaŭuloj, mi kutime plezuras enriskiĝi tra tiuj subtegmentejoj, mutaj ĉeestintoj de miaj knabaj ludoj kaj peketoj; kaj dum unu el miaj lastaj ekskursoj, malantaŭ iaj malnovaj luliloj, kofroj kaj jam eksigita apogselo, mi trovis kelkajn kestojn

plenigitajn je malnovaj, pergamenbinditaj libroj, diversaj libregoj, kompleta Kristana Jaro kun la "dominikoj" de pastro Croisset, kurioza ekzemplero el Robinson kaj, jen kio nin precipe interesus: paperrulaĵo dubeflava, enpolvigita kaj ligita per ruĝa rubando.

Ĉio ĉi estis heredaĵo al ni postlasita de unu el la onkloj de mia patro, nome, la paroĥestro Don Mikaelo de Maĉaparra, translokiĝema kaj ĉasema pastro, iom infektita je demokratiismo kaj kies morto okazis je 1874-a aŭ 1875-a.

Nu, tiu paperrulaĵo estis, kio ŝajne senkaŭze pli ekscitis mian scivolemon. Malpacience mi malfaris la komplikajn nodojn ĉe la rubando kaj volvis inverse la paperfoliojn por ricevi legebligan ebenon. Ĝi estis manskribaĵo iom stranglitera kaj strekabunda. Inter la du unuaj folioj estis metitaj kelkaj dufolioj, kiuj sendube enhavis klarigon pri la cetero. Tiuj ĉi estis propramane skribitaj de nia pastra onklo kaj ili tekstis jene:

"Vera kaj detala raporto pri la plej stranga okazaĵo min trafinta dum miaj lastaj kvindek jaroj de kaĝula perdrikĉasisto.

Sanon, religion kaj respublikon, karaj gefratoj!
Pli ĝustadire, karaj genevoj, ĉar por vi mi skribas

tiun ĉi raporton; sed la predikeja kutimo igas min interkonfuzi malkonvene gefratojn kaj genevojn. Mi diris *sanon*, ĉar sen sano ĉio cetera estas senutila; mi diris *religion*, ĉar sen religio estus la homo kvazaŭ kavernoĝa estulo blekema kaj hufbatema; mi diris *respublikon* tial, ke spite ĉiajn admonriproĉojn de Lia Episkopa Moŝto, mi ĉiam restas respublikano sed respubliko, kie ne manku pano nek justo sub la ŝirmado de sankta frateco kristana.

Kaj post ol diri tion ĉi, kio ja estis dirinda, mi revenas al mia stranga, ĉasista okazaĵo. Kaj ĝi estis, ke antaŭtagiĝe en la 11-a de Februaro de la nuna kaj difavora jaro 1874-a, unua datreveno de la jasmortinta Infanino (*), kaj jartempo, je kiu, kiel vi ja scias, la perdrikĉasa sezono troviĝas en sia tuta pleneco, mi komencis fari, kiel eble plej rapide, la antaŭmatenan meson. Ĝus fininte la komunio, mi tuj ekpensis, ke ĉe la fenestra krado de mia domo jam staras alligita azenino selita de mia preĝejservisto; ke mia fama ĉaslogperdriko, nomita Prim, jam havas surmetita la kaĝotegilon; ke mia prajmpafilo atendas pretigita malantaŭ la pordoklapego kaj... ke estus domaĝe, se pro malfruo je kelkaj minutoj mi ne povus pafi geparon da perdrikoj, kiun la pasintan vesperon mi vidis flugdefali por tranokto ĉirkaŭ la ĉaskaŝejo de Valentin. Mi tuturĝe venis al "Ite, missa est" kaj rapidiris al mia hejmo, trinkis glason de lakto kaj provis rajdi la azeninon, malfacila tasko tial, ke la kompatinda preĝejservisto kaj mi devis triumfi super miaj multjareco kaj reŭmatismo, antaŭ ol igi min rajdanta. Mi pendigis Prim sur mia dorso kun la tuta karesemo postulita de tiel bonega ĉaslogulo kaj, antaŭmetinte laŭlarĝe mian pafilon, mi travivis ankoraŭ unu fojon tiun feliĉan momenton de tagiĝa ĉasisto, sin ekdirektanta al la kaŝejo.

Petĉjo, la preĝejservisto, malpacientiĝis tial, ke la maljuna azenino paŝradis malpli rapide ol li.

—Tenu vin firma, sinjoro pastro!—Kaj tuj post la averto, jen vergobato sur la azeninpostajoj.

Ni jam staras sur "Los Cerretes" kaj ankoraŭ oni ne ekvidas ĉe l'Oriento la ekmatenruĝon. Ja malmankis al ni la tempo. Dio estu laŭdata! Mi eĉ povas ekfumi cigaredon dum Petĉjo malapudigas la azeninon. Li revenas, eniras kune kun mi en la kaŝejon kaj kvazaŭ bobeniĝas ĉe mia flanko. Galerito ekkantas. Tio estas la plej certa anonco. Tuj post unu minuto ekkantas perdriko. Hela lumstrio etendiĝas super la kontraŭaj montetoj, kiuj ornamas siajn suprojn kvazaŭ per brulanta kufajo. Jen la horo. Jen mia horo. Kaj subite, rompante tiun silentan ĉarmon karesatan de subtila venteto, diras "bonan tagon" al ni, brave kaj fanfarone, kampara virseksa perdriko. Mi ne eraris. Guste tien flugdefalis por tranokto la geparo. Prim eĉ ne bezonas provoki. Ĝi limiĝas je kelkaj "glu-glu" sekvataj de milda "huri-ri" por inde akcepti la kuraĝulon. Mi vidas tiun ĉi venantan serĉe al la kaĝejo, sed mi ne ĝin prientantas: certe mi ĝin tenos. Miaj okuloj serĉas la inon, forte trapenetrante la lastajn ombrojn. Fine mi vidas ĝin, beketantan maldekstre. Mi ĝin alcelas kun maljunula flegmo kaj ekpafas. La kamparo estas skuiĝinta ĉe la bruego. La mondo ŝajnas ekvekiĝi,

protestante kontraŭ tia profanado. De la kaĝejo mem la virseksulo ekflugas; sed, ĵus aŭdinte la venkokrion de Prim kaj ne vidante sian inon, ĝi sin ĵetas kure, malespere sur la kaĝon, kiun ĝi estus renversinta per sia brusto, se la antaŭan momenton mi ne estus renversinta ĝin mem per alia pafo.

Daŭrigota.

ESPERANTO EN KASTELJONO

Antaŭ kelkaj tagoj ni ricevis leteron de nia kun-societano Sro. Mikaelo Manteca el Kasteljono, per kiu li sciigas al ni la pioniran laboron, kiun li kun sia frato Emanuelo, Sro. Rochera kaj aliaj samideanoj de tiu bela, mediteranea urbo faris favore al Esperanto, ĝis kiam ili sukcesis fondi la 29-an de Marto nunjara grupon titolatan "Verda Rondeto". De tiu tempo la anaro de la grupo duobliĝis kaj nuntempe ĝi kreskas pli rapide, ĉar la fundamenta propagandlaboro estas jam farita.

Nur estas bedaŭro, ke pro translokiĝo de Sroj. Manteca en Talaveron de la Reĝino, ili ne plu povos tiom aktive okupiĝi pri sia fondita societo. Sed kompanse eble ili atingos enkonduki nian lingvon en sian novan loĝurbon, daŭrigante tiel sian laŭdindan, pioniran agadon.

Cetere la fervoraj samideanoj de Kasteljono tre bone scios daŭrigi kaj progresigi societeton, kiun ili plensukcese fondis post venko je multe da malfacilaĵoj.

Niajn bondezirojn kaj gratulon por Sroj. Manteca kaj liaj kunlaborantoj en Kasteljono.

Esperanto en la Valencia Internacia Specimenfoiro

Daŭrigante plurjaran kutimon, ankaŭ nunjare Esperanto havis standon en la "XIX Valencia Internacia Specimenfoiro (Hispanujo)", kiu okazis dum Majo. En ĝi estis prezentataj afiŝoj pri eksterlandaj similaj foiroj kaj ankaŭ bildoj montrantaj la aplikon de la lingvo al turismaj celoj. Samideanoj deĵorantaj tie disdonadis propagandilojn al la vizitantoj. La stando aspektis bele kaj ĝi trafe altiris al si la atenton de la publiko.

La "Grupo Esperantista Valencio", organizinto de la ekspozicio, petas la geesperantistojn el ĉiuj landoj, ke ili sin turnu al "Comité de la Feria de Muestras—Valencia—España" kun peto, ke oni presigu esperantlingve la eldonotajn murafiŝojn kaj faldfoliojn pri la venontjara Foiro.

EKSPOZICIA MATERIALO

Por propaganda, baldaŭa Ekspozicio, kiun Frateco preparas nuntempe, ni petas al la ĉiulanda esperantistaro, ke ĝi bonvolu sendi al ni ĉiuspecajn esperantajojn, kiel poŝtkartoj, libroj, gazetoj, afiŝoj, reklamiloj, gvidfolioj, turismaj broŝuroj, insignoj k. t. p.

Frateco pro tio restos tre danka al tiuj, kiuj tiamaniere helpas la propagandon de Esperanto en nia urbo kaj regiono.

(*) Tiel hispanoj familiare nomas la Respublikon.

Anekdotoj pri Edison

Edison apartenas al la kategorio de senmortaj homoj. Lia giganta kaj unika laborado, kiu tute ŝanĝis la fizionomion de la mondo, estas ja neelĉerpebla fonto, per kiu nutriĝas la nuna civilizacio kaj per kiu nutriĝados tiuj, kiuj postvenos. Tiel ĉio rilatanta Edison'on estas ĉiam aktuala kaj interesa.

Tiu ĉi konvinkiĝo puŝas min konigi du anekdotojn, kiujn granda amiko de Edison, Sro. Ford, rakontas en unu el siaj libroj:

“La 11-an de aŭgusto de 1896 mi kunvenis unuafoje kun Edison.

Ni okazigis Edison-kunvenon: ĉiujara kunveno, en kiu ĉeestis la honora inĝeniero kaj la direktoroj de la diversaj entreprenaj societoj de Edison por fari, interŝanĝajn eksperimentojn. Mi ĉeestis kune kun Aleksandro Dow, prezidanto de la kompanio Edison de Detroit.

Ĉe la tablo traflugis la konversacio, ĝis kiam Aleksandro Dow per fingro montris min dirante:

—Jen estas junulo, kiu konstruis veturilon moviĝantan per gasmotora.

Daŭrigas Ford rakontante, ke oni petis al li, ke li konigu detalojn pri la veturilo kaj ke, ĉar Edison estis iomete surda, ne povante lin bone kompreni, li petis lin sidiĝi apud li.

Tiam li respondis tutan serion da demandoj. Kiam li finis, Edison forte kaj bruege pugnobatis sur la tablon kaj ekkriis:

—Aŭdu min, junulo, tio estas perfekta; vi martelis ĝuste sur la najlon. Daŭrigu tiel.

Elektraj veturiloj bezonas proksimajn elektrocentrojojn; akumulatora baterio estas tre peza; vaporveturiloj ankaŭ ne bone taŭgas, ĉar ili bezonas kaldronon kaj fajron. Via veturilo estas sendependa. Ĝi mem kunportas sian propran fortoprovizon... Nek fajro, nek kaldrono, nek vaporo...

Daŭrigu tiel kaj ne senkuraĝiĝu.—

* * *

Ford rakontas alian anekdoton kiu montras la eksterordinare karakterizan fidon, kiun li havis al si mem por konvinki aliajn pri ties kapabloj:

Iun tagon antaŭ lin sin prezentis antikva telegrafisto, kun kiu li kunlaboris dum sia juneco kaj kiu petis lian protekton, ĉar li perdis sian okupon. Edison respondis al li:

—Mi ne scias, kie eble ekzistas nun tasko por vi, sed estas en Nov-Jorko kelkaj personoj, kiuj pagus 5000 dolarojn al tiu, kiu elpensus efikan alarmaparaton por bruladoj. Ĉiuj vi ne faros ĝin kaj vi povos gajni la diritan monkvanton?

—Mi neniam elpensis ion—diris la telegrafisto—kiel mi povus gajni tiun sumon?

—Sed tio neniel gravas—aldonis Edison.—Vi estas telegrafisto. Vi scias tiom multe pri elektro, kiel mi, kiam mi komencis.

Mi povus fari ĝin, se mi havus tempon, sed mi estas tre okupata pri miaj aliaj aferoj. Mi metas por via dispono mian eksperimentejon; faru ĉion ceteran.—

Tiu viro komencis la laboron kaj gajnis la premion kaj poste realigis ankoraŭ aliajn elpensadojn, per kiuj li sukcesis kolekti belan kapitalon.

JESUO PUÉRTOLAS.



«Sro. I. H. Krestanov

Lekcio de Sro. I. H. Krestanov

La 20-an de la nuna monato faris en salonego de la Medicinlernejo belan kaj pleninteresan lecion temantan pri sia lando, Bulgarujo, la eminenta gazetisto kaj informanto de la Ĝenerala Regantaro de la ŝtataj fervojoj kaj havenoj, Sro. Ivan H. Krestanov, L. K.

Pli allogigis la interesan lecion bela kolekto de projekciaj lumbildoj.

Pro manko de tempo kaj spaco ni prokrastas ĝian delatan raporton ĝis la julia numero.

« NIA GAZETO »

Ĉi tiu esperanto-gazeto, eldonata en Francujo, kies formato estas 43'5 × 31'5 centimetra, konsistas el multaj paĝoj ilustritaj per belaj fotografioj kaj estas redaktata de profesiaj gazetistoj nome: Georges Avril, S. Grenkamp-Kornfeld, Julio Baghy ktp., kies nomoj estas ja tre multe konataj en Esperantujo kaj garantias la bonstilon kaj altan intereson de la enhavo.

La abonejo en Hispanujo por ĉi tiu tre grava, ĉiumonata gazeto estas “Aragona Esperanto-Federacio” — strato Roda 10, Zaragozo —, do ĉiuj hispanoj dezirantaj ĝin aboni faru la abonpeton pere de ĝi.

Jarabono por hispanoj: 6'45 pesetoj, sendokoste enkalkulita.

VIZITO DE SRO. GRENKAMP

La pasintan monaton Majo ni ricevis la agrablan viziton de la eminenta samideano Sro. Grenkamp Kornfeld, kiu post pasigo ĉe ni je kelkaj horoj daŭrigis sian vojaĝon al Parizo.

Ni nur bedaŭras, ke li tiom malmulte da tempo povis resti kun ni, ĉar por ni estis ja granda plezuro ĝui la agrablegan kaj spritan konversacion en tre bona Esperanto de tiu eminentulo. Ni do diru al li: “Ĝis revido”.